

# Spes, Christe, nostræ veniæ

## Brevier-Himno

Komunaj tekstoj > Funebro > matena laŭdo

*Spes, Christe, nostræ veniæ,  
tu vita, resurrectio;  
ad te sunt corda et oculi  
cum mortis dolor ingruit.*

*Tu quoque mortis tædia  
passus dirosque stimulos,  
Patri, inclinato capite,  
mitis dedisti spiritum.*

*Vere nostros excipiens  
languores, pastor miserens,  
tecum donasti compati  
Patrisque in sinu commori.*

*Apertis pendens brachiis,  
in cor transfixum pertrahis  
quos morituros aggravat  
morbus vel mæror anxius.*

*Qui portis fractis inferi  
victor pandisti cælicas,  
nos nunc dolentes erige,  
post obitum vivifica.*

(Pro unu defuncto:)

*Sed et qui frater corpore  
nunc dormit pacis requie,  
iam te beante vigilet  
tibique laudes referat.*

(Pro una defuncta:)

*Sed et quæ soror corpore  
nunc dormit pacis requie,  
iam te beante vigilet  
tibique laudes referat.*

(Pro pluribus:)

*Sed et qui fratres corpore  
nunc somno pacis dormiunt,  
iam te beante vigilent  
tibique laudes referant.*

*Amen.*

latina T: nekonata verkinto

Ho, Krist', espero de l' pardon',  
Vi nia vivo kaj leviĝ',  
al Vi sin turnas kor' kaj vid',  
dum mort-dolor' atakas nin.

Vi mem suferis sub la ted'  
de l' mort', sub ĝia akra dorn',  
klinante Vian kapon Vi  
redonis al la Patro Vin.

Malsanojn niajn portis Vi,  
paŝtist', kompatas Vi kun ni.  
Suferi povas ni kun Vi  
kaj morti en la Patra sin'.

Per brakoj etenditaj Vi  
al Via traborita kor'  
altiras, kiujn morto-sort'  
afliktas, feblo kaj angor'.

Vi rompis pordojn de l' infer',  
apertas la ĉiel' al ni.  
Vi nun nin levu el sufer',  
vivigu nin post nia mort'.

(6-a strofo por unu mortinta viro:)

Ĉi frato, kiu dormas nun  
laŭkorpe tie ĉi en pac',  
per Vi beate viglu jam  
laŭdante kaj glorante Vin.

(6-a strofo por unu mortinta virino:)

Fratino, kiu dormas nun  
laŭkorpe tie ĉi en pac',  
per Vi beate viglu jam  
laŭdante kaj glorante Vin.

(6-a strofo por pluraj mortintoj:)

Ĉi fratoj / Fratinoj / Gefratoj, kiuj dormas nun  
laŭkorpe tie ĉi en pac',  
per Vi beate viglu jam  
laŭdante kaj glorante Vin.

Amen.

E: Kloster Kirchberg 2008